

Christian Morgenstern,

Adiaŭo

tradukita de Willy Nüesch

“Kredeble jen la lasta foj’
ke via man’ en mia kuŝas...
Ke via sang’ la mian tuŝas...
Ho se vi scius pri l’ malĝoj’!

Ridetas vi el bona kor’
kun milda bril’ okula, oj...
Vi ne konscias pri l’ dolor’:
Kredeble estas lasta foj’!”

*Traduko de la Germana poemo “Abschied” de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-193-386 (2013-08-26 21:57:17)

La tradukinto Willy Nüesch (Etselstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto “Arirgiope.bl0rg.net”. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo “Fonto” n-ro 274 en Oktobro 2003.